


# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

merkredon, la 8-an de Julio, 2015 • numero naŭ

## Kio okazos hodiaŭ?

★ 8:30 – 11:00 atm  
Lecionoj



★ 11:00 – tagmezo  
Grupa kunveno en  
Flowe 110

★ 2:00 – 3:15 ptm  
Libera tempo por pakado, ktp.

★ 3:15 – 4:30 ptm  
Video-ludoj en Esperanto  
en Flowe

Ben SPEAKMON prelegos. Li priskribas la prezentaĵon jene: “Videoludoj estas kaj profesio kaj ŝatokupo por mi. Ili estas la plej disvastigita speco de amuzo en la tuta mondo, eĉ pli ol libroj, filmoj aŭ muzikaĵoj. Mi prelegos pri la uzo de Esperanto en lastatempaj ludoj, miaj traduk-projektoj, kaj la defioj apartaj en tia laboro.”

★ 7:00 – 7:45 ptm  
Diplom-ceremonio  
en Flowe 110

★ 8:00 ptm – iam  
Adiaŭa festo: neformala kunveno  
ĉe la trinkejo *Tyler’s Tap Room*,  
trans la strato de nia loĝejo.

### La NASKa Fasko

Redaktejo: Finley 112

<nask.esperanto@gmail.com>

La *NASKa Fasko* estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, plendon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al:

<nask.esperanto@gmail.com>

## Tim WESTOVER adiaŭas

Jam ni venas al la lasta tago de la ĉi-jara NASK kursaro. Sed espereble ni ne venas al la fino de nia amikeco. Ni ĉiuj pasigis belajn tagojn ĉi tie, studante la lingvon, legante la literaturon, kaj enkapigante la participojn. Ni trinkis, drinkis, festis, spektis, parolis, kaj karambolis. Tiuj, kiuj neniam antaŭe parolis Esperanton, sukcesis komunikiĝi kun homoj plej diversaj, per nia internacia lingvo. Se vi ne antaŭe kredis, certe nun vi scias, ke Esperanto estas vigla estaĵo, taŭga por viglaj homoj kiel ni.

Do, kion fari poste? Trovu unu la alian en *Facebook*, *Twitter*, ie en Interreto. Babilu, instigu, kuraĝigu. Faru ion ĉiutage per Esperanto, eĉ se temas nur pri retmesaĝo al amiko, legado de aŭdiĵoj en *Facebook*, esploro de poemo

aŭ novelo. Se vi ne trovas vin inter esperantistoj, provu pensi en Esperanto dum via ĉiutaga vivo: “ho, tiu araneo estas granda”, “mi bezonas aĉeti pli da vino”, “kial estas tiom da aŭtoj sur la strato – ĉu temas pri *Duolingo*-kongreso?” Farinte ion ĉiutage, vi ne perdos la gajnojn, kiujn vi akiris ĉi tie, kaj tagon post tago, pliboniĝos viaj kapabloj kaj viaj rilatoj kun la granda Esperanta panoramo.

Kiel NASK-studinto, vi havas specialan aliron al ni instruistoj. Liĉjo, Paŭlo, Ĵenja, kaj mi feliĉe konsilos kaj helpos dum viaj venontaj paŝoj en la lernado de la lingvo.

Ĝis iam ie en Esperantujo!



## Profitu per Esperanto! *de Maria MURPHY*

Antaŭ du semajnoj mi iris al teatrejo. Bedaŭrinde la malmultekostaj biletoj jam elĉerpigis. De apuda giĉeto mi aŭdis ke junulino petas bileton por studentoj. Do mi diris al la giĉetulo, “Ankaŭ mi estas studento de Esperanto survoje al univer-

sitato.”

“Ĉu vi vere parolas Esperanton?” surprizite diris la sinjoro en giĉeto.

Efektive, li kaj lia ĉefo ambaŭ estis kaŝitaj esperantistoj kiuj iam provis lerni Esperanton.

## Esperanto ĉirkaŭ ni



— Kia aŭto staras tie? — Kia.  
— Jes, kia? — Jes! — Do... kia aŭto staras tie? (Dankon al Brian HARMON)



Ray REDD trovis la jenan skatolon de kraĵonoj en la kampusa vendejo. Ray supozas ke la kraĵonoj estas “nur por priskribi tion, kio ekscitas la menson.”